# Kontroli la semojn estas kontroli la popolojn

## *Revista Fusión*

*Krom la korporacioj, komerciigantaj la nutraĵojn, kiel* Cargyll, *dediĉita al la greno, kaj la spekulaciistoj, kiuj operacias ĉe la borso, la kontrolo sur la nutraĵoj estas fakte ĉemane de kvar korporacioj. F. William Engdahl nomas ilin "la kvar rajdantoj de la transgena apokalipso" kaj ili estas nome:* Monsanto Corporation, Du Pont Corporation *-kaj ties* Pioner Hi-Brend International- *kaj* Daw Ago Sciences *-ĉiuj tri usonaj- kaj* Syngenta, *kiu estas svisa. Tiuj ĉi korporacioj uzas, kiel ties plej taŭgan armilon, la transgenaĵojn aŭ semojn genetike modifitajn.*

Pretekstante helpi la disvolvon de la planedo, eta aro el entreprenoj kontralas tutmonde la semojn, kiuj estas bezonataj por kulturi. Kun la transgenaĵoj kaj ties patentoj ili havas la ŝlosilon de la nutra ĉeno. Marjo R. Fernández de *Alternativa Latinoamericana* (Latin-amerika Alternativo), esploris la aferon.

***-Kio konsistigas la industrion pri la agronegocoj kaj kio sin kaŝas sub tiu supoza tasko "helpi la disvolvon ĉe la mondo"?***

-Unue la industrio pri la agronegocoj estas tutmonda produkta infrastrukturo pri nutraĵoj, kiun kontrolas malgranda aro el privataj entreprenoj. Ĝi baziĝas sur io tiom malnova kiel la agrikulturo. kaj la produktado pri nutraĵoj, kio estas parto de la disvolvoprocezo de la homaro, kiu el rekolektanta fariĝas bestodresanta kaj produktanta pri bazaj nutraĵoj por ĉiuj. Tial oni parolas pri "privatigo" de riĉaĵo, kiu estas komuna; kielo de iuj malmultaj alproprigi ion, kio apartenas historie al la tuta homaro. Tio estas aliigi la agrikulturon al "industrio".

Tiu granda negoco komencas ĉe Usono per la fratoj Rockefeller kaj ties ideo eki projekton pri tutmonda ekspansio, pri diversigo de ties negocoj, pri regado, pri povo kaj memkompreneble pri mono. Ili estas tiuj, kiuj ekis la tielnomitan "Verdan Revolucion", kiu komencis je la 50-aj jaroj ĉe Meksikio kaj kiu poste kompletiĝas per ties alia projekto, la tielnomita "Genetika Revolucio".

*La Verda Revolucio estis ĥemia revolucio antaŭenigita de petrolĥemiaj korporacioj, kiuj trudis la uzon de herbicidoj kaj pesticidoj al multaj malriĉaj landoj, kiuj ne povis aĉeti ilin sen la kreditoj, pruntedonitaj de la Monda Banko*

***Estas laŭleĝaj strategioj sed ankaŭ malleĝaj por trudi la genetike modifitajn semojn al la agrikulturistoj, kamparanoj aŭ landoj.***

Por helpi tiun ĉi ekspansion oni uzas du argumentojn, kiuj iom post iom fortiĝas. Unu: temigi kiel problemon la kreskadon de la tutmonda loĝantaro –vidpunto jam komencita de Malthus. Du: la ideo pri tio, ke nur "libermerkata" sistemo povus sekurigi la nutraĵon al tiu kreskanta loĝantaro. Aliaj alternativoj, kiel ekzemple la komunismo, estis rekte rifuzitaj de Rockefeller mem pro ties netaŭgeco "nutri la mondon". La finfina ideologia argumento estis atingi krei interligon inter la fratoj Rockefeller kaj la "disvolvo de la mondo".

***-Kiu kontrolas hodiaŭ la nutraĵojn kaj kiel?***

-Krom la korporacioj, komerciigantaj la nutraĵojn, kiel *Cargyll*, dediĉita al la greno, kaj la spekulaciistoj, kiuj operacias ĉe la borso, la kontrolo sur la nutraĵoj estas fakte ĉemane de kvar korporacioj. F. William Engdahl nomas ilin "la kvar rajdantoj de la transgena apokalipso" kaj ili estas nome: *Monsanto Corporation*, *Du Pont Corporation* –kaj ties *Pioner Hi-Brend International*– kaj *Daw Ago Sciences* –ĉiuj tri usonaj– kaj *Syngenta*, kiu estas svisa. Tiuj ĉi korporacioj uzas, kiel ties plej taŭgan armilon, la transgenaĵojn aŭ semojn genetike modifitajn.

La Usona Kongreso koncedis ekskluzivan patentan rajton pri tiuj semoj al tiuj ĉi korporacioj kaj ĝi faris tion laŭdire, por protekti tiujn semojn kaj eviti ties poluadon per DNA (genetika materialo) fremda al la genaro de la planto –evitante, ke ĝi estos aliigata aŭ grave modifita.

***-Kiun rolon ludas je tiu afero la kreskego de la genetike modifitaj semoj?***

-Tiuj ĉi "modifitaj semoj", nun patentitaj, estas produkto iranta al la merkato. La korporacioj, kiuj proprietas tiujn patentojn, uzas strategiojn por enigi sian produkton en la tutmonda merkato. Engdahl, per sia libro "Detruaj semoj", klarigas tri fazojn je la enigo de genetike modifitaj semoj flanke de la grandaj korporacioj. Tiu unua estas unuiĝi aŭ aĉeti surlokajn entreprenojn de ia graveco. Tiu dua estas certigi atingi lokajn patentojn pri genetikinĝenierartaj teknikoj pri gravaj diversaĵoj aŭ bankoj de semoj. Finfine ili vendas la semojn a la agrikultoroj aŭ kamparanoj kaj signigas kontrakton al tiuj, per kiu ili ne rajtas uzi dugeneraciajn semojn sed nepre aĉetu semojn por la sekva semado al la korporacio –kion ili devas fari ĉiujare kontraŭ alta prezo. Tiuj ĉi estas la laŭleĝaj strategioj, sed ili uzas ankaŭ malleĝajn taktikojn por trudi la genetike modifitajn semojn al la agrikulturistoj, kamparanoj aŭ landoj. La rekta kaj malrekta trudo

por devigi la aĉeton kaj la kontrabando estas iuj el ili.

***-Ĉu estas landoj, kiuj ne submetiĝis al la "invado" de la transgenaĵoj?***

-Eble jes, ĉar la meĥanismo, kiun uzas tiuj ĉi korporacioj por altrudi siajn transgenajn semojn, iel dependas de la Monda Organizaĵo pri la Komerco (MOK). Tial eble ne ĉiuj estus submetiĝintaj ankoraŭ al la transgenaĵoj. Sed prave scii tion estas malfacila afero. Ekzemple je la 2004a jaro 56% el la burĝojoj de sojo kaj 28% el tiuj de kotono je la tuta mondo estis transgenaj. Ĉe la Tria Mondo tiuj ĉi semoj sin trudis ĉefe kaŭze de la febleco de tiuj landoj kaj de la kunkulpo de ties registaroj kaj elitoj –tia estis la okazo de Argentino. Sed aliloke ili altrudiĝis perforte, kiel ĉe Irako post la invado, kiel parto de la ekonomia ŝok-terapio.

Dum iom da tempo la Eŭropa Unio malpermesis la transgenaĵojn pro sciencaj kaj prisanaj kialoj –oni temigis la efikon de tiuj nutraĵoj sur la loĝantaro–, sed je la 2006a ĝi ŝanĝis de sinteno. Ne estas facila afero, scii kiom da transgenaĵoj estas nek ĉe kiuj landoj. Surmomente Usono, Kanado kaj Argentino estas tiuj, kalkulantaj la plej altan indicon pri poluado el grenoj genetike modifitaj.

***-Kiun taskon realigis kaj realigas ĉe tiu ĉi afero la Monda Organizo pri Komerco kaj la Monda Banko?***

***La industrio pri la agronegocoj estas tutmonda produkta infrastrukturo pri nutraĵoj, kiun kontrolas malgranda aro el privataj entreprenoj***

-La MOK helpis trudi la leĝan kadron, ĉe kiu oni patentas la transgenajn semojn. La leĝan kadron konsistigas la "Rajtoj pri Intelekta Proprieto Koncerne al Komerco" (Trade Related Intellectual Property Rights), normoj, kiujn ĉiuj landoj membroj de la MOK devis aprobi por protekti la patentojn de la plantoj. Tiel estas, kiel la semoj aliiĝis al patentaj produktoj. Je la 2003a pro akuzo de Usono, Kanado kaj Argentino (la landoj plej poluitaj de transgenaĵoj) tribunalo ĉefita de la svisa juĝisto Christian Haberli verediktis kontraŭ la Eŭropa Unio kaŭze de "ne plenumi iliajn devigojn" kiel membro de la MOK -kio povus okazigi ĉiujarajn mono-punojn de centoj da milionoj da dolaroj.

Aliflanke la Monda Banko estis ekde sia fondiĝo okcidenta regilo, ĉefe usona. La ligoj de la usona elito kun la Direktoraro de la Monda Banko helpis financi projektojn pri akvumsistemoj, digoj ktp, nepraj eroj por komencigi la "Verdan Revolución". La Verda Revolucio estis ĥemia revolucio antaŭenigita de petrolĥemiaj korporacioj, kiuj trudis la uzon de herbicidoj kaj pesticidoj al multaj malriĉaj landoj (aŭ survoje al disvolvo, kiel oni nomas ilin), kiuj ne povis aĉeti ilin sen la kreditoj, pruntedonitaj de la Monda Banko

***-Kiel povas reagi la popoloj kontraŭ tiom da altrudaĵoj? Kion fari?***

-La ekzemplo de la Eŭropa Unio montras la laŭrajtecon kaj eblecon rezisti, kvankam estu nur por malrapidigi la procezon kaj konsciencigi pri tiu altrudo

de transgenaĵoj –ĉefe, ĉar ni nescias iliajn sekvojn sur la sano kaj ĉe la kadro de la nacia suvereneco.

Vandana Shiva, premiita per *Alternativa Nobel-premio*, organizis la kamparanan reziston ĉe Barato kaj kontribuis la sciigon pri la transgenaĵoj. Shiva verkis multajn librojn, inter kiuj "Mensaj Monokulturoj", "Tera Demokratio. Justeco, Elteneblo kaj Paco", "Dispartita Barato. Sieĝo al la Diverseco kaj la Demokratio". Shiva kreis la movadon NAVDANAYA-n, http://www.navdanya.org

***Dum iom da tempo la Eŭropa Unio malpermesis la transgenaĵojn pro sciencaj kaj prisanaj kialoj, sed je la 2006a ĝi ŝanĝis de sinteno***

Ĉe Latin-Ameriko la *Movado de Agraraj Senteraj Laboristoj* de Brazilo – iu el la plej agemaj kaj internacie agnoskitaj movadoj– luktis kontraŭ la transgenaĵoj dum pli ol 25 jaroj.

Gravas, ke personskale la homoj sciiĝu pri tiaj aferoj. Verkintoj, kiel F. William Engdahl per sia libro "Semoj de Detruo. La Sekreta Agendo de la Genetika Manipulado", kontribuis al nia kompreno pri la agendo, kiun oni volas trudi al ni. Michel Chossudovsky montris tion, kio kaŝas post la tutmondiĝo, per sia libro "Tutmondiĝo de la Malriĉo kaj Nova Tutmonda Ordo". Profesoro Chossudovsky ankaŭ prizorgas retpaĝon, kiu estas ĵus premiita per la *Internacia Ĵurnalista Premio* kiel plej bona internacia esplor-retpordo: www.globalresearch.ca.

*Controlar las semillas es controlar a los pueblos*. EcoPortal. Esperantigis Jurgo Alkasaro

www.EcoPortal.net